


KOMENCANTO

gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Bill Thorne
[LONDONO, Anglio]

2000

redakcie — periodo de solidiĝo en E-literaturo — aforismoj
originale verkita — paĝoj por bonhumoro — daŭrigo de la
proverb-ludo — kriptogramo — anekdotoj — korespondu!

4

PERANTOJ de KOMENCANTO

laŭ ĉi-subaj adresoj vi povas aboni nian gazeton

ARGENTINO

Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

AŬSTRALIO

Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

BRAZILIO

Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

BRITIO

Esperanto-Asocio de Britio, 201 Felixstowe Road, Ipswich, IP3 9BJ

ĈEĤIO

Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1, CZ-696 62 Strážnice

DANIO

La Gazetoservo de Danio. Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykøbing F.

ESTONIO

Virve Ernits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn

FRANCIO

- Unuigo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cernaie, 75004, Paris.
- R.Melo, 34, Av. de Russie, FR-03700, Bellerive S/A

GERMANIO

Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

IRANO

Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

ITALIO

Itala Esperanto Federacio, Via Villorresi, 38, 20143, Milano.

ITALIO, KROATIO, SLOVENIO

Višnja Brankovič, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste

KUBO

Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, HAVANO

LITOVIO

Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

NORVEGIO

Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 OSLO

POLLANDO

Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

SVEDIO

SEF, Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE — 24294 Hörby

SVISLANDO

Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

USONO

Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

redakcie

Karaj legantoj!

Sur la kovrilo de la gazeto vin salutas nia patriarko Bill Thorne kaj ene vi renkontos multajn novajn por vi aŭtorojn.

Ni daŭrigas rakonti pri E-literaturo.

Vin ankaŭ atendas tradiciaj aforismoj, senditaj al ni el diversaj anguletoj de nia mondo. Ĉi tie debutas nia nova "aforismoŝatanto" Jurij Ŝutov.

Ni prezentas al via atento kelkajn originalaĵojn, inter ili filozofian poemon de V. Sajtgarajev kaj du verkojn de niaj jam konstantaj aŭtoroj M. Zujeva kaj S. J. Bullo.

La redakcio dankas niajn novajn aŭtorojn el Hispanio Carmen Llapart kaj el Ruslando Irina Sabirova, kiuj debutas ĉe la paĝo 8. Altigas humoron sur la paĝo 9 Jelena Burgas kaj tradicie Bill Thorne.

En la gazeto ankaŭ sekvas daŭrigo de la temo "Ĉu vi volas esti riĉa aŭ feliĉa?" Tre interesan kriptogramon sendis Artur Hismatullin, kiu mem refaris la desegnaĵon por la esperantlingva frazo. Estas tradicia la paĝo de anekdotoj, kie debutas kiel pentristo S. Naumoviĉ.

Vi trovos adresojn por korespondi kaj ankoratŭ anoncon de Hungara Esperanto-Junularo.

Sur la 8-a kaj 10-a paĝoj de KOMENCANTO-3 ne estis indikita aŭtoro de la pentraĵetoj, li estas Jurij Perevalov el Lesnoj, Ruslando, ni petas pardonon ĉe Jurij.

La redakcio senlace invitas vin, karaj legantoj, kontribui por KOMENCANTO! Estu kuraĝaj kaj sendu viajn provojn!

AGRABLAN LEGADON!

La redakcio danke akceptas donacojn por prospero de KOMENCANTO!

KOMENCANTO

2000 numero 4 / refondita en 1997/ 8 numeroj jare

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev

konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova

adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando

retpoŝto : let@epost.uralpost.ru

abontarifo por 2000:

internacia tarifo: 13 eŭroj aŭ \$14;

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo : \$11;

aŭ por ĉiuj — 15 IRK

konto ĉe UEA: vkud-a

ruslanda tarifo kaj la rubla zono: 77 рублей

(за 8 номеров в год) простым почтовым переводом на имя Кудрявцева Виктора Васильевича: 620041, Екатеринбург, а. я. 132

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el KOMENCANTO.

Sola kondiĉo - nepre menciŭ KOMENCANTO'n kaj la nomojn de la aŭtoroj kum ties loĝlokoj.

Verkistoj de periodo de solidiĝo en E-literaturo (parto 2)

Karaj legantoj, nia ĉi-numera artikolo pri E-literaturo en historia aspekto daŭrigas prezenton al vi famajn verkistojn de la unua periodo en la Esperanta Beletro. Kune kun Zamenhof kaj Grabowski unu el la plej brilaj nomoj de tiu periodo estas Kazimierz Bein. Inter esperantistoj li estas pli konata sub la nomo *Kabe* — pseŭdonimo, kiun li uzis en sia literatura agado.

Kazimierz BEIN

Kazimierz Bein — polo, naskiĝis en 1872-a jaro, estis eminenta okulkuracisto: li verkis multajn pri-fakajn librojn, fondis la Varsovian Instituton por Okulmalsanoj, kies direktoro li estis dum multaj jaroj.

Li esperantistiĝis en 1903 kaj fervore eklaboris. En 1904 aperis lia unua tradukaĵo “La fundo de l’ mizero” de pola verkisto Waclaw Sieroszewski; en 1905 — sekvis traduko el verkoj de romantika verkistino Eliza Orzeszkowa — amrakonto “Interrompita Kanto” kaj en 1906 — “Elektitaj fabeloj” el la kolekto de la fratoj Grimm.

En 1906 K.Bein jam estis vicprezidanto de la Akademio de Esperanto kaj laboris en tiu posteno ĝis 1911, kiam li forlasis la Movadon je zenito de sia literatura kariero. La motivoj de ĉi-forlaso ĝis nun ne estas klaraj: ĉu personaj konfliktoj, aŭ profesia okupiteco, aŭ senreviĝo pri la estonto de Esperanto. Sed de tiu momento nomo de Kabe fariĝis kvazaŭ simbolo de apostateco: la eksepantistojn oni ofte nomis “kabeoj.”

K.Bein ne verkis originale, sed nur traduke. Laŭ lia opinio “la lingvo profitas pli multe per la tradukado ol per originala verkado.” Fakte, kiam originala verkisto dum sia laboro renkontas stilan aŭ espriman malfa-

cilajon, li povas ĝin eviti, anstataŭante aŭ eĉ forlasante la frazon. Sed la samon ne povas fari tradukisto, ĉar li estas ligita per la senco kaj la formo de la originalo.

En 1907 aperis la ĉefverko de la tradukarto de Kabe — traduko de la trivoluma romano de Boleslav Prus “La Faraono” — interesa historio el la egipta pratempo. Per tiu ĉi traduko li meritis la epiteton “unua stilisto de la Internacia Lingvo”

Laŭ Kabe: “La bona stilo estas bazita ĉefe sur simpleco kaj natureco kaj por tio en Esperanto la plej bona rimedo estas: lerta evitado de necesasaj sufiksoj, kunmetitaj vortoj kaj tempoj.”

Fakte Kabe havis grandan influon rilate al la evoluo de la Esperanta prozo - stilo. Lia influo igis la lingvon pli fleksebla, pli libera, pli eleganta. Liaj frazoj estas klaraj, simplaj, li preskaŭ ĉiam evitas la kompleksajn verboformojn (estas - inta; estis - anta), ĉiu vorto troviĝas sur ĝia ĝusta loko. Li mem klarigis tion en intervjuo por por la revuo “Literatura Mondo” en 1931 per sia plurlingveco: “por havi bonan stilon, nepre estas necese koni minimume tri diversajn lingvojn.”

En 1909 aperis en traduko de K.Bein la romano de Iv. Turgenjev “Patroj kaj filoj”; samjare li ankaŭ tradukis prozlikran verkon de Turgenjev “Versaĵoj en prozo”.

Aparte necesas mencii la unuan esperantolingvan antologion — “Polan Antologion”, pretigitan de K.Bein al la eldono en 1906, Internacian Krestomation” - verkon el 7 lingvoj, kiun li eldonis en 1907, du prilingvajn librojn “El la historio de Esperanto” (1906), kaj “Unua legolibro (1908) kaj finfine la unuan “Vortaron de Esperanto”, aperintan en 1910, en kiu li difinas la E-vortojn tre klare, tre trafe, en sia karaktera stilo.

Ĉi-tie ni prezentas malgrandan fragmenton el la ĉefa tradukverko de Kabe — romano “Faraono”.

La Faraono

...

Jam duonhoron la taĉmento iris en la serpentalinia intermonto, kies muroj estis nudaj kaj krutaj, kiam la avangardo ree haltis. En tiu ĉi loko estis alia intermonto, transversa, en kies mezo estis elfosita sufiĉe larĝa kanalo.

Kuriero sendita al la ministro kun la sciigo pri la malhelpo, alportis ordonon senprokraste pleniĝi la kanalon per tero.

Ĉirkaŭ cent grekaj soldatoj kun pinthakiloj kaj fosiloj rapide eklaboris. Unuj dishakis ŝtonegojn, aliaj ĵetis fragmentojn en la kanalon kaj surŝutis sablon.

Subite el la fundo de la intermonto eliris homo kun pintohakilo, kiu havis formon de cikonia kolo kun beko. Tio estis egipta kamparano, maljuna, tute nuda. Momenton kun plej granda miro li rigardis la laboron de la soldatoj, poste subite li saltis inter ilin, kriante:

— Kion vi faras, idolanoj, tio ja estas kanalo?...

— Kaj vi, kiel vi kuraĝas insulti la soldatojn de lia sankteco? — demandis lin Eunana, jam ĉeestanta tie.

— Mi vidas, ke vi devas esti Egiptano altranga - respondis la kamparano - mi do respondos al vi, ke la kanalo apartenas al potenco sinjoro: li estas ekonomo de la skribisto de tiu, kiu portas la ventumilon de lia ekscelenco la monarĥo de Memfiso. Gardu do vin, ke malfeliĉo ne trafu vin!...

...

Verkistoj de la periodo de solidiĝo en E-literaturo

(daŭrigo)

Leo BELMONT

Leo Belmont (1865-1941) - ankaŭ estas inter la unuaj pioniroj de Esperanto.

Fakte L.Belmont estis literatura pseŭdonimo, lia vera nomo estis Leopold Blumental.

Li naskiĝis kaj loĝis en Varsovio, finis tie la universitaton kaj poste laboris kiel ĵurnalisto; estis redaktoro de literatura kaj politika pola gazeto "Libera vorto". Pro siaj politikaj artikoloj Belmont estis 5-foje malliberigita kaj unu foje eĉ ekzilita.

Li esperantistiĝis en 1887, post nelonge li skribis salutleteron al Zamenhof, finante ĝin per la vortoj: "Vi venkos, sinjoro, vi venkos!"

Leo Belmont estis konata kiel lerta tradukisto, bona oratoro, majstro de la deklamarto. Li tradukis multajn historiajn romanojn ("Messalina", "Mme Pompadour", "Dubarry", "Veĉera" kaj aliaj), kontribuis por multaj gazetoj per tradukaĵoj kaj originalaĵoj. Tre bonaj estas liaj eseoj, kiujn li verkis por la revuo "Literatura mondo". En 1908 aperis lia poemkolekto sub la titolo "Sonoj esperantaj".

En la Esperanto-movado L.Belmont okupis ankaŭ gravan lokon. En lia pollingva gazeto "Libera vorto" multe da loko okupis la defendo de Esperanto. Li estis gvidanto de l'unua rusa Esperanta Societo en Petrograd kaj poste de l'unua pola Esperanto Societo en Varsovio, ankaŭ estis vicprezidanto de Pola Esperanta Asocio kaj Akademiano.

Post la forpaso de Zamenhof, dum lia entombigo, Leo Belmont adiaŭtis lin per funebra poemo.

Do, la aktiva pionireco en la E-movado kaj multnombraj literaturaj verkoj, kiuj restis post L.Belmont, faras lin sendube memorinda persono.

Sube vi, karaj legantoj, trovos malgrandan ŝercan verseton de Leo Belmont.



Ŝekspir- Adorantino

De maten' knabino sidas

Kaj Ŝekspiron studas.. Van'!

Ne kombita via haro

Ne lavita estas man'...


Do, Ŝekspir vin pli instruu

Malgraŭ sia sort-malbon'

Lavas manojn Lady Makbet

Kombas harojn Desdemon'!

Jurij Perevalov
[LESNOJ, Ruslando]



Suz flugiloj

de ĉiela vento

Antoni KOFMAN

Inter E-verkistoj kaj tradukistoj de la unua periodo estis ankaŭ Antoni Kofman — ruso, librotenisto el Odesso (Rusio), naskiĝis en 1865, esperantisto ekde 1889.

A.Kofman aktive kunlaboris en pluraj revuoj per originalaĵoj kaj per multaj, lingve interesaj tradukaĵoj. Originale li verkis epigramecajn satiraĵojn, moketajn poemetojn kaj la poemon "Filino de Iftah".

A.Kofman estis poligloto, tradukis el 18 lingvoj. En 1896 aperis la dramo "Kain" de Byron en traduko de Kofman. De li estis farita la unua provo traduki el la helena (el la antikva Greka literaturo) — partojn el la "Iliado" de Homer; tradukis ankaŭ partojn el la "Faŭst" de Goethe, la kvinaktan komedion de Beaumarchais "La edziĝo de Figaro".

En la komenca periodo de la literatura lingvo traduka maniero de A.Kofman vekis admiron per sia esprimkapableco kaj samtempe arta simpleco.

Bedaŭrinde li forlasis Esperanton en 1907 kaj t ransiris al Ido, poste al Occidental kaj tiel forperdiĝis liaj nepridubeblaj talentoj.

Aforismo estas frato de anekdoto, amiko de paradokso kaj filo de saĝeco

{N.Neksin}

AFORISMOJ


kolektis kaj esperantigis
Jurij Ŝutov
[VOLGODONSK, Ruslando]

*La 1-a de aprilo
estas tago, kiu memorigas
al ni, kiu ni estas dum la
restantaĵ 364 tagoj.*
{Mark Twain}

*Ni ne scias, kion fazi
pri nia kuzta vivo, tamen
intencas vivi eterne.*
{A.Frans}

*Poz skizbi amleteron,
necesas komenci sen scii,
kion vi volas diri, kaj fini
ne sciante, pri kio vi
skizbistis.*
{J.J. Russo}

Jurij Perevalov
[LESNŬJ, Ruslando]



*En la vivo - kiel en
la amo: konscienco -
kontzaŭ, sed la sana
instinkto - poz.*
{S.Batler}

Esperantigis
Lilija Burgas
[VOLGODONSK, Ruslando]

*Saĝuloj elpensas
saĝaĵojn, malsaĝuloj
disvastigas ilin.*
{H.Hejne}

*Ordinaze al la vizoj
estas pli agzable vidi bone
garnitan manĝo-tablon, ol
aŭdi, ke lia edzino parolas
la grekan.*
{S.Gonson}

*Kia utilo de la libroj
al tiu, kiu ne havas pro-
pran saĝon? Ĉu spegulo
helpas al blindulo?*
{Hindia sentenco}

*Li sidis sur du seĝoj.
Ĝis tiam, kiam komprenis,
ke sur kvar seĝoj oni
povas kuŝi.*
{Jan Lukaa}

*Jen la demando:
ĉu al Afziko cikonio venas
aŭ revenas?*

kolektis kaj esperantigis
Peter Miles
[LONDONO, Anglio]

*Pratipo malfacile
troveblas, sed estas ĉiam
facile rekonebla*
{John L.Mason}



Nina Vinnikova
[NOVOALTAJSK, Ruslando]

*Nur tiu, kiu fidas al si
povas esti fidela al aliaj*
{Erich Fromm}

*Nur stultulo ĝenas sin pri
la afzeroj, kiujn li ne povas
inŝlui*
{Ben J. Wattenberg}

Martin Glnette
[SAULXURES/MOSELOTE,
Francio]

*Estas granda avantaĝo
esti nenion fazinta, tamen
oni ne devas tro zesti en
tiu avantaĝo*
{Rivarol}

*Ŝtat-oficejo estas
loko, kie la malŝzuanta
oficistoj renkontas sur
ŝtupazo la kolegojn, kiu
jam ŝzue lasas laboron*
{Georges Courteline}

Mi malamas vin
 Mi malamas maskon vian
 Kun kiu vi ludis per mi
 Por kio mi estis punita per Di?
 - Nun tuj diru al mi.
 Ho, Di! Kion mi faris ne tiel por ŝi?
 Mi ĉiun tagon la florojn alportis al ŝi.
 Mi kisis la lipojn de ŝi
 Mi amon konfesis al ŝi
 "Ni estos kune": ŝi diris al mi
 Ho, ve! Sed ne okazis tio
 Mi malamas tagon,
 Kiam unue renkontiĝis kun vi
 Ĉu mi povos forgesi pri vi? - Ho, Di'!
 Versajne ne. Mi ne povos.
 Sed por forgesi vin rapide
 Mi konatiĝos kun fraŭlin' alia
 Kiu ne estos tia kiel vi
 Kiu sen masko estos
 Kiu ne ludos kiel vi per mi
 Mi malamas vin
 Kaj Di' juĝist' al tio estas
 Li vidis ĉion
 Kun ni okazis kion.
 En impeto de l' pasi',
 mi nenion scias pri vi
 Pri viaj voluptemaj ludoj
 Pri okuloj nukleaj viaj
 Frenezigaj ĉiujn
 Al mi ŝajnas, ke mi ne estis sola tia
 Kredinta en feliĉon tiun nian
 Kiu donis unu al la alia
 Por ke ĝi revenu
 Demetu maskon tiun
 Maskon de malbon'
 kaj maskon de malĝoj'
 Mi tuj al vi pardonos ĉion
 Ĉe vi aperu la rider'
 Kiel per blu' ekludos antaŭe la okuloj.
 Forbruligu maskon tiun
 Ĝi per blua flamo brulu
 Malbono kaj malĝojo brulas kune.

Sajtgarajev V.
 [JU]NO-SAĤALINSK,
 insulo SAĤALIN
 Ruslando]

MASKO



Naila Sadretdinova,
 [TAŠKENTO, Uzbekistano]

Margarita Zujeva [MOSKVO, Ruslando]

Eseo

PIJTORESKA NGĈO

Okazas tiel: nenio plaĉas. Ĉu estas laco de vivo? De homoj?

Mi havas feliĉon: subite neatendita, neklarigebla ŝato ka intereso al falanta akvo — al kaskadoj kaj fontanoj.


Kredeble tial, ke en mia vivo malaperas diversaj objektoj kaj la zorgoj, iĝas por mi nedeviga, sed falanta akvo kompensas ilin. Akvofalo devas esti sammezurebla por homo, tial al mi estas pli proksimaj “ĉambraj” kaskadoj. Mi perceptas kaskadojn kaj fontanojn kiel io vivanta, aganta, proksima al mi pro spirito. Tial mi tiras manojn al ĉi tiu fluetanta akvo, ĝi estas fonto por konsumanta en mi ĝojo.

Mi lavas manojn per tiu ĉi magia roso, mi viviĝas, kaj iĝas por animo pli facile, kaj iom pli lume ĉirkaŭe, precipe se la suno frakasas je miliardoj de brilantoj ĉi tiun falantan suben belecon.

Apud kaskado kaj fontano vi ne sentas vin sola. Kun ili oni povas interparoli, kaj aŭskulti ilin. Nuntempe ofte oni povas aŭskulti vortojn: “varmaj homoj”. Mi opinias, ke flueto de la falanta akvo varmigas miajn manojn responde je dankema rigardo pro ĝia beleco kaj neceso por mi.

Povas esti pitoreskaj fluetoj de kaskadoj kaj fontoj iĝos por vi saviga niĉo en ia tempo. Ja vivo estas multvaria.

Kaj se vi ne havas grandajn ĉagrenojn, ni iru kune al ĝoja akvo. Ne perdu kuragon!



Snejana Kononova
[NIŬNJAJA OMKA, Ruslando]

Kononova

Blanka katinino, griza hundeto


Santi Elena Bullo [MESTRE, Italio]

Ludas la infanoj en la bela ĝardeno...
Kunĉi kun ili ludas malgranda katinino,
je glata felo kaj hundeto je hirtaj haroj.
nun ĉiuj kuras, saltas, plezure krias...
Neniu vidas ke la katinino glitas sur la ŝtonoj
de la baseno plenplena je friska akvo.
Helpu! Ĝi povas tuj sin dronigi...
Sed la hundeto eksaltas en la basenon,
ĉe la nuko kaptas la katinon, kuraĝe
ĝi savas la besteton... Bone...
Tiamaniere komenciĝas daŭra amikeco...

DEBUTO

Rideto

Rideto kostas nenion kaj multe valoras.
 Ĝi riĉigas tiujn, kiuj ĝin ricevas,
 sen malriĉigi la donintojn.
 Ĝi dauras kiel spiro,
 sed ĝia memorajo iĝas eterna.
 Neniu estas sufiĉe riĉa por subesitmi ĝin.
 Neniu estas sufiĉe malriĉa por ne meriti ĝin.
 Ĝi feliĉigas hejme, apogas negocojn.
 Ĝi estas sentiva signo de amikeco.
 Rideto ripozigas laculojn,
 donas bravecon al malkuraĝuloj.
 Ĝin oni nek aĉetas, nek pruntedonas, nek ŝtelas,
 do estas io sen valora,
 ĉar ĝi estas donaco.
 Kaj, se foje vi renkontas homon
 kiu ne scias rideti,
 estu malavara, donu al li la vian,
 ĉar despli bezonas rideton
 tiu, kiu ne povas doni ĝin al aliuloj.



esperantigis el M. GANGHI
Carmen Llapart,
 [FIGUERAS, Hispanio]

Snejana Kononova,
 [NIJNJAJA OMKA, Ruslando]

Sabirova Irina
 [KIZILSKOE, Ĉelab. obl.
 Ruslando]

Infanaj recitaĵoj

Unu, du, tri, kvar...


Jurij Perevalov
 [LEŜNOJ, Ruslando]



Unu, du, tri, kvar,
 fiŝoj naĝas en la mar',
 kvin, ses, sep, ok,
 birdoj sidas sur la rok'
 Diru naŭ, poste dek —
 unu fiŝo en la bek'!

- 1, 2, 3, 4 - ni ripozas en arbar'
- 2, 3, 4, 5 - ni saltadas sen la fin'
- 3, 4, 5, 6 - en arbar aperis best'
- 4, 5, 6, 7 - ni forkuris en la step'
- 5, 6, 7, 8 - poste grimpis sur la rok'
- 6, 7, 8, 9 - malaperis unu fraŭlo
- 7, 8, 9, 10 - estas nure via pek'

Rafija Jafarova
 [EKATERINBURG, Ruslando]



kopis kaj alsendis
Arthur Hamatullin
[TROJCK, Ruslando]

Esperantigis:

Jelena Burgas

[VOLGODONSKO, Ruslando]

Revuo de Surskriboj

Sur la pordego de zooparko:

"Oni petas ne tuŝi urson: ĝi, interalie, ne estas tapiŝo apud lito".

Sur la pordo de florvendejo:

"La floroj tie ĉi estas tiom multekostaj, ke ilin povas aĉeti eĉ edzoj... "

Sur la pordo de telefonstacio:

"Ne skribu leterojn, telefonu!. Tio donos al vi eblecon eviti ortografiajn erarojn"

En flughaveno:

"Interkisu ĝustatempe! La aeroplanoj startas precipe laŭ horaro!"

Sur la pordo de garaĝo:

"La aŭton mi ne havas, la biciklon oni jam ŝtelis, mi petas vin ne maltrankviliĝi."

Sur la pordo de virsalono de frizejo:

"Ne en haroj konsistas feliĉo!"

William Thorne

[LONDONO, Anglio]

En la 7-a kajero de 1999 ni lanĉis serion de rakontoj "el la vivo de ordinara brito" — veraj okazintaĵoj, kiuj okazis al nia konstanta kunlaboranto kaj aŭtoro Bill Thorne, kiu nun estas jam delonge emerito, sed bone memoras diversajn okazintaĵojn, kiuj "havis fakton esti".

1957

ARANEO

Li estis filo de *Kimra* virino, kiu evidente esperis ke li iĝos fama, kiel muzikisto aŭ inĝeniero. (Nun li famas per E-to).

Kiam li aliĝis al nia uzino, li diligente komencis laboron, fabrikante grandan modelon de araneo. Ne gravas pri la reala tasko. Ni iris al la manĝoĉambro por tea-paŭzo, kaj li dolĉe metis lian kreaĵon sur la ŝultro de apuda knabino.



Ŝiaj kamaradoj rigardis ŝin silente, kaj ŝi ĝojis pro ilia nekutima atento, do ŝi babilaĉis arde. Fine, ŝi suspektis ion, ĉar la tuta ĉambro silentiĝis. Kiam ŝi rigardis ĉirkaŭe, ŝi vidis araneon sur sia ŝultro. Ŝi ne ekkriis, ŝi nur ĝemis, do ĉiu ĝojis, aparte ŝi mem. Estis bona reago.

Ĉu vi volas esti riĉa aŭ feliĉa?

distra-amuza ludo
sendu al ni aforismojn, proverbojn,
mikronovelojn, satirojn, desegnaĵojn laŭ la
temo

Peter Miles, {LONDONO, Anglio}

*Sukceso ne estas la rezulto de spontana ekbrulo.
Oni devas unue ekflamigi sin*

{Freed Shero}

Martin Ginette, {SALHURES/MOSELOTTE, Francio}

*Pigra homò estas homo, kiu ne montras saĝon
de la laboro*

{Alphonse Allais}

Jurij Ŝutov {VOLGODONSK, Ruslando}

*Kiam mi estis juna, mi supozis, ke mono estas la
plej ĉefa en la vivo. Nun, kiam mi maljuniĝis, mi
tion scias.*

{O. Ŭajld}


*Se vi ĉiutage laboros po 8 horojn, vi povos iĝi
ĉefo, kaj labori po 12 horojn.*

{R.Frost}


Svetlana Naumoviĉ, {TJUMENO, Ruslando}

*Nepre edziĝu! Se vi havos bonan edzinon, vi estos
feliĉa. Se vi havos malbonan edzinon - vi iĝos
filozofo.*

{B. Sou}



kopis kaj alsendis
Artur Hismatullin
{TROICK, Ruslando}



KRIPTO GRAMO

Artur Hismatullin
{TROICK, Ĉelabinska reg., Ruslando}

*Aĝo de tiu ĉi instruilo estas multaj kaj multaj
centjaroj, Sed legos vi ĝin, certe, pli facile, ol
tiuj, kiuj ĝin tradukis el la lingvo de la antikvaj
egiptanoj.*

Ŝlosilo por diveno:

Oni komencas legi ek de la litero, al kiu
montras la dekstra mano de la egiptano kun la
"distanco", indikita per lia maldekstra mano.
Se vi vere solvos la kriptogramon, vi legos
saĝan aforismon, kiu komencas per la vortoj:
"Agu vere....!" Fakte ĝi bone taŭgas por la
supra temo: "Ĉu vi volas esti riĉa aŭ feliĉa?"



Jelena Jakovleva

[ARHANGELSK, Ruslando]

Por la gazeto mi volas rubrikon pri sen-danĝero. Mi provas traduki el la libro.

Nepre aĉetu fajfilon!

Malluma vespero. La viro promenas laŭ la strato. Subite atdeblas voĉo:

- Sinjoro, ĉu vi ne vidis apude policon?
- Ne
- Tiam demetu vian palton!

Tio estas nur anekdoto, sed en la reala vivo povas okazi io simila. Sed se oni sekvas certajn regulojn, promenado okazos sendanĝera kaj agrabla.



Nepre aĉetu fajfilon kaj ne timu ekspluati ĝin okaze de danĝero.



Se vi paŝas laŭ strato, nepre uzu pavimon flanke kontraŭ movo de trafiko - tiam malfacilas ataki vin el aŭto.



Se oni vin persekutas - kuru al la lokoj kun amaso da popolo. Se persekutanto atakas vin, laŭte krii, petu helpon. Bone eksciu ĉiujn vojetojn kaj anguletojn apud via loĝloko, por scii, kien preferindas kuri.

Margarita Zujeva


[MOSKVO, Ruslando]



- Oni diras, ke vi serĉas novan kasiston?
- Jes, kaj malnovan ankaŭ.



- Sonoro de vekigilo influas je min, kiel eksplodo.
- Ĉu vi tuj eksaltas?
- Ne, kuŝas kvazaŭ mortigita.



- Mia ventro doloras, - diras paciento al kuracisto-kirurgo.
- La afero seriozas. Necesas fortranĉi orelojn.
- Neniuokaze! - ekkrias la paciento kaj forkuras al terapiisto.
- Ho, tiuj kirurgoj, - grumblis la terapiisto. - Mi donos al vi du tablojdojn, la oreloj mem defalos.

volo al la vivo



Unu fojon en monato mi vizitis kuraciston - ja li ankaŭ volas vivi.

Poste ĉiujn rekomenditajn medikamentojn mi aĉetas en apoteko - ankaŭ ĝi volas vivi.

Sed ĉiujn tiujn medikamentojn mi forĵetas en rubujon. Ja ankaŭ mi volas vivi.



- Sinjoro kuracisto, ĉu vi helpas min?
- Mi opinias, ke ne. Vi ne prenas kuracilojn, kiujn mi al vi preskribis, ne sekvas dieton, drinkas, fumas, kaj kio estas la plej malagrabla — vi sentas vin pli kaj pli bone!



Svetlana Naumoviĉ
[TJUMENO, Ruslando]

KORESPONDU!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Pagintaj abonantoj de "K" - senpage

Internacia Koresponda Esperanto-Klubo

serĉas novajn garmikojn tm. Ni eldonas la gazeton por abonantoj-klubanoj. Skribu:

Morgun Timur, ab.k 279,
LPECK, 398050,
RUSIO.

S-ro Olaf Seek

40-ja., faldaboristo pri konstruado, ŝatas diskuti pri ĝeneralej kaj interesaj temoj

A.Milarch-Str. 16,
DE - 17033 -
Neubrandenburg,
GERMANIO.

Rusa familio kun 2 infanoj

Irina (28ja) kaj Dima (30-ja) Goubin

Irina Goubina ab.k. 89,
656038, Altajskij kraj,
BARNAUL

RUSIO

lc991lg@lc.dcn-asu.ru

S-ro Henribill Junqueira

Korespondi kun gejunuloj kaj kolektantoj de telefonkartoj

Av. Anchieta, 490-32,
Centro. BR 11660-010
CARAGUATATUBA,
SP.(1986)

BRAZILO

František Šmid

aktiva kolektanto de poŝtmarkoj, deziras interŝanĝi ktp...

Budejovicka 345
46008 LIBEREC 8
ĈEĤIO

S-ro Sergio Luis Lobo Faria

Havi amikinojn en la tuta mondo

Rua Vieira Ravasko, 945 -
Santa Cruz., BR 23520-180,
RIO DE JANEIRO, RJ.

BRAZILO

S-ro

David H. Withey
Skoltismo.

21 Breekfied Avenue,
Waterloo,
LIVERPOOL, L22 3YE
ANGLIO

S-ro Matthew Sharp

48 ja., Ebleco de reciproka gastigado.

34 Lynton Road,
Kilburn,
LONDON,
NW 66BL
ANGLIO

S-ro Hector Campos Grez, Skoltismo.

Casilla do Correos 231,
Septima Region,
CURICO.
ĈILIO

M-me Maryse Chomet

40 ja., edzo Dominiko kaj filino Laetitia. Ni loĝas en centro de Francio, kolektas pk pri naturo kaj ŝatas Esperanton

Palabost, 03300,
CREUZIER LE NEUF
FRANCIO

S-ro Havao Zeng

ebleco de reciproka gastigado

Guan-Yuan 2-7-201,
CN-100034
BEIJING
ĈINIO

s-ro Jerzy Dembicki

68-j. sperta esperantisto, dez. kor. pri diversaj temoj.

Daszynskiego 1/34,
33-300 Nowy Sacz,
POLLANDO.

F-ino Katarzyna

Jakubowska,
22-ja., volas kor. kun samideanoj pri ĉiuj eblaj temoj pere de Esperanto, kiun ŝi tre ŝatas.

ul. Poznanska 87/8,
PL-87-100 Torun
POLLANDO,

Celso Fonseca Jr.,

67-j. fluginstrukturo, dez. kor. pri aviadiloj, aviadilmod-eloj kaj rilataj poŝtmarkoj

rua Tiradentes 1183,
BR-13215-371
Jundiaj SP,
BRAZILO.

Hungara Esperanto-Junularo

27-a de julio — 2-a de aŭgusto 2000

INTERNACIA JUNULARA SEMAJNO

La 13-a Internacia Junulara Semajno (IJS) estas tradicia renkontiĝo en la hungara urbo Nyireguzhaza. IJS havas unikan etoson, ĝi estas la plej populara somera renkontiĝo de la mez-eŭropaj junuloj. Vin atendas tutsemajna festivalo kun popularaj programeroj kiel ekskursoj, kulturaj kaj artaj ludoj, noktumado en urbo kaj en naturo, varia distra programo, ĉiunokta diskoteko — kaj plej grave: vera esperanta etoso kun speciala hungara gastaĵo.

La plej allogaj programeroj: neforgesebla surpriza festo dum la tradicia balo; ekskurso al Tokaj, la plej fama vinregiono en Hungario; vizito al unu el plej famaj pomĝardenoj de la regiono...

Kostoj inter 250 - 320 DM. Inkluzivas lokon en studenta hejmo en 3-litej ĉambroj kun duŝejo kaj necesejo en la koridoro.

Informoj ĉe: Hungara Esperanto-Junularo,

Hungario, HU-1675, Budapeŝt, pf. 87

hejmpaĝo: <http://www.math.bme.hu/~hej/>

Esperanto Rondo bezonas diversajn materialojn: librojn, gazetojn, broŝurojn ktp. Ĉiuj donacantoj ricevos dankrespondon sur kolora E-bildkarto.

E-Rondo de PEA, str.
Mazowiecka 23,
82-200 Malbork,

POLLANDO.

Jorje Geha

deziraskorespondi tutmonde p. ĉ.t.

Rua: Dn Ernesto Gorno
Nº 48/101
KOBASOL -SAO-JOSE
SC, BR-88102-260

BRAZILO

KOMENCANTO-2000

abono de KOMENCANTO-2000 kostas 77 ruslandajn rublojn.
Internacie: 13 eŭroj al UEA-konto "vkud-a" aŭ ĉe via landa peranto

